

23

*Druck*

Varbovicejo  
por Esperanto-Kongreso 1922

Jaro VI (VIII)

Aprilo 1913

en Libera Urbo Dan. № 4 (73) 72

**ESPERANTYSTA**

**POLSKI**

**POLA ESPERANTISTO**

**Kuneldonantoj:**

S-oj: Prof. D-ro Odo Bujwid, D-ro L. Chybczyński, M. Czerwiński, Jan Günther,  
D-ro A. Nauman.

**Protektoroj-subtenantoj:**

S-oj: L. Bogusławski, S. Essigman, A. Grabowski, Kielca Soc. Esp., J. Loth,  
R. Maske, A. Zakrzewski, D-ro Leon Zamenhof.

**Helpantoj:**

S-oj: J. Chankowski, D-ro Gelibter, B. Jabłkowski, A. Koziara, B. Radzy-  
miński, D-ro W. Róbin, B. Szczepankiewicz, J. Tejchfeld, R. Vogel, H. Wie-  
rzchowski, D-ro A. Zamenhof, F. Zamenhof.

Adreso de la Redakcio kaj Administracio: Varsovio, Ŝopena 8, telefono 160-24.

Prezo 20 kop.



## „Esperantista Polski“

W ROKU 1913

będzie wychodzić regularnie co miesiąc w 16-stronicowej objętości o urozmaiconym programie.

Roczna prenumerata z „Dodatkiem Literackim“ 2 rb. 50 k. z przesyłką pocztową.

Adreso de la Redakcio kaj Administracio: Warszawa (Polujo) Ŝopena 8.

## „Pola Esperantisto“

EN 1913 JARO

aperados ĉiumonate en 16 paĝa amplekso kun diversigita programo kaj „Literatura Aldono“

Jar-abono kun la „Literatura Aldono“ rb. 2.50 = 2.65 kun poŝta trasendo.

## Cena ogłoszeń

na okładce:

Cała II strona, 4-o szpaltowa . . . rb. 32.—  
„ III i IV . . . . . po „ 25.—  
Wiersz petitowy, jednoszpaltowy  
na II-ej stronie . . . rb. —.20  
„ jak wyżej na III i IV stronie „ —.15

Najmniejsze ogłoszenie 1 rb.

Od ogłoszeń stałych lub kilkakrotnych ustępuje się odpowiedni rabat.

## Prezo de anoncoj

sur kovrilo:

Plena II-a paĝo, 4-kolona . . . . . rb. 32.—  
„ III k. IV paĝoj . . . . . po „ 25.—  
Unu linio petita, unukolona, sur II paĝo „ —.20  
„ „ „ sur III k. IV paĝoj . „ —.15

Plej malgranda anonco kostas 1 rb.

De konstantaj aŭ kelkfojaj anoncoj estas de-kalkulata konvena rabato.

## Riceveblaj en Administracio de Pola Esperantisto:

### „Antaŭen kun Kredo!“

Literatura Jarlibro de „P. E.“ por 1911 jaro.

La prezo de bela 200 paĝa volumo estas: por abonantoj de „P. E.“ 0,50 Sm. „ne-abonantoj 1,00 Sm.

La bela 200 paĝa volumo kun interesa kaj abunda enhavo, skribita en perfekta Esperanto devas troviĝi en biblioteko de ĉiu amanto de nia lingvo kaj literaturo.

## LA NEĜO

Kvarakta dramo de St. Przybyszewski  
(Pŝibyŝevski) trad. T. Ficovski.

La prezo 50 kop.

## SI, LA TRIA

Belega novelo de Henryk Sienkiewicz,  
tradukita de Antoni Grabowski

La prezo 50 kop.

## „Pekoj de l' Infaneco“

bela novelo de Bolesław Prus,  
tradukita de Antoni Grabowski

Prezo 35 k. por abonantoj de „Pola Esper.“ 20 k.

## Jarlibroj de Pola Esperantisto

Jarlibroj el jaroj: 1908, 1909, 1910 kaj 1911 — estas riceveblaj  
kaj malpligrandigitaj prezoj — po 1-Sm.


Jarlibroj — 1912 j. — po 1.50 Sm.

en ADMINISTRACIO DE POLA ESPER.


VARSOVIO, ŜOPENA 8.

# POLA ESPERANTISTO

Monata Gazeto por propagando de Esperanto



## ESPERANTYSTA POLSKI



Miesięcznik poświęcony sprawie Języka Międzynarodowego

Aprilo 1913

WARSZAWA—VARSOVIO

Jaro VIII — Nro 4 (73)

### GRAVA AVIZO!

● Onantoj, kiuj ankoraŭ ne sendis sian abonpagon por 1913, sed ne rifuzis aboni, resendante al ni ricevatajn numerojn de la gazeto, estas konsiderataj kiel ŝuldantoj; ili bonvolu **senprokraste** sendi la abonpagon rb. 2 kop. 50 (2,65 Sm.) al nia Administracio Varsovio, Sopena 8.

**Aprila n-ro estas la lasta, kiun ni sendas al nepagintoj!**

### Niaj devoj.

Malgraŭ nuna granda sukceso de esperanta movado en ĉiuj partoj de nia terglobo, ekzistas milionoj da homoj en ĉiuj sferoj, sed precipe en sferoj popolaj aŭ necivilizitaj, kiuj ankoraŭ tute ne aŭdis la vorton Esperanto.

Tio ne estas mirinda pro rilate mallonga tempo de ekzisto de Esperanto, pro nesufiĉeco de propagando kaj cetere pro tre malalta nivelo de kleriĝo de popolo. Ni konsideru tamen opiniojn de tiuj, kiuj, estante en pli bonaj cirkonstancoj materialaj kaj kulturaj, aŭdis ion ajn pri Esperanto.

● Lejparto da homoj bonstataj respondos al ni: „ah, ni tute ne bezonas Esperanton, sen ĝi al ni estas tute bone en la mondo.“ Aliaj, konsentante principe la gravecon kaj eblecon de interkompreniĝo de ĉiuj popoloj kaj internacian harmonion dank' al unu simpla rimedo—facila kaj logika lingvo internacia, diros: „mi ne havas tempon okupiĝi pri ĝi.“ Fine aliaj volas atendi, ĉar ankoraŭ sufiĉos la tempo por aliĝi al Esperanto poste: „kiam ĝi fine estos tutmonde akceptita.“

Oportuneco kcj prudento pravigas ilin; ili ne bezonas streĉi spiritfortojn, dediĉi tempon, laboron kaj monon, sed kiam Esperanto „estos akceptita“ ili egale profitos kun tiuj, kiuj dediĉis sian intelekton, tempon, mon-rimedojn,

por antaŭenpuŝi homaron sur la vojo al progreso kaj civilizacio.

Voli konverti al esperanta ideo, homojn, al kiuj La Providenco rifuzis eĉ fajreron de pli nobla animagordo, senton de tutmonda solidareco, inokuli en ilin la principon, ke la devo de vera homo ne finiĝas kun lia propra profito — estas nur sendanka laboro.

Sed ekzistas vastaj sferoj de inteligentularo, kiuj interesiĝus je tiu problemo, sed ili ne havas certecon, ĉu tiu tre grava kultura problemo estos iam difinitive solvita, kaj ĉu Esperanto estas efektive tiu ŝlosilo, kiu malfermos por ĉiuj popoloj trezorejon de multcentjara spirita laboro de ĉiu popolo, plifaciligos al ĉiu estadon en fremda lando, prezentos al scienco, industrio, komerco komunan internacian fundamenton de interkompreniĝo, liberigos junularon de lernejoj turmentoj (kultime senfruktaj) lerni kelkajn fremdajn lingvojn, kiu instigos la homaron al solidareco kaj konvinkos pri ĉiuj kaŭzitaj de ĝi utiloj.

La rilato de registaroj kontraŭ esperanta movado, devas esti atendanta; eĉ plej fervoraj esperantistoj ne povas postuli de registaroj pli energian subtenon de Esperanto, ĝis kiam esperanta mondo ne donos palpeblajn kaj en praktika vivo konstateblajn pruvojn, ke esperantismo posedas ĉiujn ecojn de altgrade

kultura rimedo por plialtigo de homara intelekto kaj bonstato.

Ni posedas tamen kontraŭ la registaroj kaj ankaŭ kontraŭ la skeptikuloj tre bonan konvinkantan rimedon, estas nur necese, ke ni uzu ĝin pli bone ol ĝis nun. Ni devas pli fervore subteni esperantan literaturon, esperantan ĵurnalaron kaj esperantajjn societojn. Ni devas montri al la skeptikuloj tute okulvideble, ke Esperanto posedas en si mem tiom da vivo-forto, tiom da neatingeblaj por aliaj lingvoj ecoj, ke ĝi kompare superas ĉiun naturan lingvon, ke ĝi difinas ĉiun homan penson kaj ĉiun verkon de homa spirito skribe kaj parole tiel precize, kiel tio ĝenerale estas ebla en homaj lingvoj.

Allvorte ni devas helpi disvastigadon de esperanta preso, pli fervore aĉetante esperantajn librojn kaj abonante esperantajn gazetojn.

Konfesu ĉiu esperantisto, kiom da spemiloj li elspezis por esperantaj libroj kaj gazetoj dum pasinta jaro! Ĉiu sincere konfesu tion, iom honte ruĝigu pro sia malfervoreco, konsideru kaj komprenu fine sian devon rilate al nia kara esperanta afero.

Ni nun posedas eminentajn esperantajn stilistojn, kiuj volonte enteprenus la tradukojn de multaj eminentaj verkoj nacilingvaj, nur haltigas ilin la penso, ke ilia laboro estos vana, ke eldonota libro tute senutile putros sur librejaj bretoj.

Simile okazas kun esperantaj gazetoj. Ilia nombro estas nune tute sufiĉa, sed proporcio de esperantistoj al abonantoj de tiuj gazetoj estas dolore malkontentiga. Redakcioj ne povas eĉ pensi plibonigi siajn gazetojn kaj ĝenerale multe malprofitas.

Esperantaj libroj kaj gazetoj estas egale malmultekostaj kaj vera esperantisto, kiu komprenas signifon kaj celojn de Esperanto, devas posedi sufiĉe da konsekvenco por aktivigi siajn teoriajn konvinkojn; li devas posedi en la animo tiom da oferemo por dediĉi jare, rilate malgrandan sumon por subteno de esperantaj eldonadoj. Cetere, kiu almenaŭ iom interesiĝas pri spirita vivo de aliaj popoloj, trovos jam nur en esperanta literaturo grandan nombron de tre interesaj aŭ multvaloraj verkoj kiujn li ne legis aŭ ne povus legi en originalo; en esperantaj gazetoj li trovos tamen da interesaj sciigoj el ĉiuj landoj de la mondo, ke tiu malgranda elspezo, kompare kun ricevita spirit-nutraĵo estas sensignifa.

Subtenante tiamaniere disvolviĝon de esperanta literaturo kaj ĵurnalaro ni pruvos plej bone, ke esperanta movado ne estas ia revaĵo de iaj el la ĉielo falintaj utopiuloj, sed, ke apliko de la ideo racia, posedanta ĉiujn ŝancojn por disvolviĝo, havos neantaŭvideble grandan influon je antaŭeniron de homa civilizacio. Konsideru tion, samideanoj!

En Ago — venko nia!

R. Maska.

Dresden

trad. el pola lingvo R.

## O P I N J E.

P. Paweł Desachy (Gli Blas).

Życie narodów przedstawia dziwne nie logiczności. Od wieków np. dążą do lepszego wzajemnego poznania się, do zbliżenia, o tych usiłowaniach mówią nam postępy wiedzy, ulepszenia w środkach komunikacyjnych, a jednocześnie obojętnie traktują środek porozumienia się i nawiązania stosunków, jakim byłby jęz. międzynarod., nie wykluczający mowy ojczystej, a będący tylko narzędziem zbliżenia się narodów.

Narzędzie to istnieje. Czyż mamy czekać dziesiątki lat, aby było ono uznane oficjalnie na kongresie międzynarodowym, ażeby państwa za wspólnym porozumieniem się wprowadziły wykład tego języka nie tylko w wyższych, ale i w elementarnych szkołach?

Przed 25 laty dr. Zamenhof obdarzył ludzkość jęz. sztucznym łatwym, dźwięcznym, z pierwiastkach zapożyczonych ze wszystkich niemal języków żyjących; każda narodowość znajdzie w nim setki wyrazów sobie znanych.

Powodzenie Esper, jest niezaprzeczone, pomimo, że polegało tylko na inicjatywie prywatnej, że nie spotkało żadnego urzędowego poparcia, że musiało walczyć z obojętnością i ironią ogółu lub niechęcią tych, którzy widzieli w tem zamach na mowę ojczystą.

Esper. zadało kłam wszystkim dowodzeniom; powodzenie jego jest pewnem i widocznem. usługi, jakie świadczy ludzkości są niezliczone, a z chwilą, kiedy wszystkie szkoły publiczne wykladać go będą dzieciom, znikną trudności językowe między narodami.

H A J O T A.

## La floroj de perfido.

Afrika legendo.

Malproksime, malproksime de la mara bordo, barita de montoj, kiujn piedo de blanka homo neniam tuŝis, trovas sin belega feliĉa lando, kies eĉ nomo estas nekonata de blankaj homoj.

La palmoj de tiu ĉi lando liveras plej esencan vinon kaj plej bongustan oleon, sur la fundo de bluj riveroj sin trovas pli multe da oro, ol da sablo kaj benataj fruktoj de „kola“ kreskas tie abunde, malgraŭ asertoj de saĝuloj, kiuj diras, ke „kola“ kreskas nur proksime de la maro.

La reganto de tiu ĉi feliĉa lando estis tiam potenca „kaciko Itoki“, kio signifas — suno. Ĉi posedis palacon kun kvardek galerioj kaj dekkvar kortoj. Ĉirkaŭ tiu ĉi palaco vivis kaj laboris por sia reĝo dekkvar miloj da sklavoj kaj tra kortegaj galerioj por virinoj promenadis cent kvardek belaj liaj edzinoj.

Itoki havis jam naŭdek jarojn kaj kelkaj el liaj edzinoj estis apenaŭ dekkvinjaraj, sed malgraŭ tia diferenco de l' aĝo, ili montris al la reĝo plej vivan amon. Kiam li troviĝis en illa rondo, ekzistis neniu homo pli karesita ol li.

Sed tamen Itoki ne havis aspekton de feliĉa homo. Ĝis kiam la juneco ornamis lian vizaĝon, neniu vidis lin malgaja, sed kiam la junaj jaroj forpasis kaj la maljuneco proksimiĝis, alvenadis al li stangaj pensoj, kiuj alportis al li maldolĉecon kaj dubon. Forlasante la ĉambregojn de siaj edzinoj li ripetadis ofte al si mem:

— Ĉu eble estas, ke mi povas esti tiel amata de ili malgraŭ miaj grizaj haroj kaj riginta vizaĝo? Inter ili ja sin trovas tiel junaj, ke mi povas esti illa praavo kaj ĝuste ĉi tiuj ŝajnas al mi plej sentemaj. Mi ja havas tian nombron da edzinoj kaj sufiĉas mia koro por ĉiuj, sed ili havas nur min unu solan. Ĉu estas eble, ke illaj koroj estas kapablaj nur por tre malgranda sento, aŭ por grandega fideleco! Mi diras: mi havas ilin tiel multe — sed kiom da ili mi jam havis! Mi eĉ illajn nomojn ne memoras... Ili mortis ankoraŭ junaj, donante la vivon al infanoj, aŭ je la volo de Grandaj Spiritoj. Sed tiuj povis min korami, ĉar mi estis juna kaj bela...

Tiuj ĉi pripensoj montras al ni, ke Itoki, kvankam ĉia civilizacio estis fremda al li, havis malgraŭ ĉi tio tre saĝan kaj helan opi-

nion pri aferoj, kaj eble ĝuste pro tio, ke la civilizacio ne malklarigis ĝin al li.

Sed tamen tia vidmaniero kaŭzis la malĝojon; Itoki povis nek manĝi nek dormi tran- kvile. La zorgemaj korteganoj venigis al li faman saĝulon, kiu loĝis solece en montara dezerto kaj pri kiu oni rakontis, ke li inter- komunikigadas kun Plej Grandaj Spiritoj.

Itoki kaŝema de sia naturo, hezitis konfesi al la saĝulo la kaŭzon de siaj ĉagrenoj, sed fine, konsiderinte, ke tia saĝulo scias ĉion trapenetri, li diris:

— Mi estas nek jaluzema, nek vengema, sed mi malamas esti trompata. Diru al mi, maljunulo, kion mi devas pensi pri amo de miaj edzinoj. Ĉu ĝi estas sincera? Ĉu ne loĝas en ilaj koroj perfido?

— Potenca reĝo! — respondis la saĝulo — demandu pri ĉio, sed ne pri ĉi tio. Ekzistas nenia saĝulo, kiun plej malsaĝa virino ne sci- us trompi. Nur post illa morto oni povas scii ĝin ion certan pri ili. Sed tion ne ĉiu sci- povas fari. Mi tamen scias.

— Ah! — diris Itoki — kion mi faros? Mi ne revivigos ilin por puni, se ili estis kulpaĵ.

— Certe, — konsentis la saĝulo, — sed ekkoninte la konduton de l' mortintaj edzinoj vi povas havi ĝustan opinion pri la vivantaj. Ĉiuj virinoj en fideleco aŭ perfido, en amo aŭ scivoleco, estas similaj unu al alia.

Itoki ankoraŭ ne estis konvinkita.

— Ne! ne! — diris li, skuante sian griz- haran kapon. — Mi kredas la fidelecon de mortintaj edzinoj.

Kaj li ripetis al la saĝulo tion, kion li ofte ripetis al si mem:

— Ili amis min, kaj povis esti fidelaj, ĉar mi estis juna kaj bela.

Sed la saĝulo nur ekridetis.

— Ho granda Itoki! — diris li — tio pravas ke vi tute ne konas virinojn. Ili ja povis per- fidi vin kun maljunaj kaj malbelaj. Ĉu vi volas esti konvinkita pri ĉi tio?

— Bone, — diris Itoki post ioma medito — Kion do mi devas fari?...

La saĝulo suprenlevis la okulojn kaj ko- mencis solene paroli:

— Du foje ĉiujare, antaŭ la sezono de granda sekeco kaj de grandaj pluvoj, aliras el montoj, kie loĝas Plej Grandaj Spiritoj, te- rura vento, nomata La Vento de l' Vero, kaj ĉi transblovas la tutan mondon. Ĝia nomo

estas konata nur de saĝuloj kaj de justaj homoj, kiuj interkomunikigas kun Spiritoj, sed ni povas ĝin facile ekkoni, ĉar ekzistas preskaŭ nenia homo, kiu ne sentas ĝian pikadon. Sub trablovo de tiu ĉi vento, elkreskas sur la tomboj strangaj floroj, kiuj daŭras nur unu nokton. Ĝuste nun, post kelkaj tagoj, tia vento alvenos. Kiam ĝi komencos blovi kaj fariĝos nokto kaj luno leviĝos, iru, potenca reĝo, eksterurben sur tiun monteton ĉirkaŭitan per alooj, kie en ombro de palmoj kuŝas viaj mortintaj edzinoj. Kiom da ili vi jam enterigis?

— Mi pensas, ke ĉirkaŭ ok „tally“<sup>1)</sup> — respondis Itoki — sed mi bone ne memoras. La lasta enterigo estis antaŭ unu jaro. Tiu ĉi edzino estis malplej amata de mi, ĉar jam en juneco ŝi akiris malsanon, kiu malbeligis ŝian vizaĝon. La kompato nur igis min teni tian edzinon. Mi eĉ ne estas scivola vidi ŝian tombon.

— Saĝa homo neniam malfermas la okulojn, ĉar el ĉie la instruo povas alflui — rimarkis la saĝulo kaj daŭrigis:

— Iru do, granda Itoki, kaj rigardu atente la tombojn. Kiu el viaj edzinoj estis malfidela en siaj pensoj, sur ties tombo vi ekvidos blankan floron, kun tiaj punktetoj, kvazaŭ iu surŝutis pistitan ruston. Perfidulinoj en paroloj havas sur siaj tomboj florojn ruĝajn, kiel sango kaj super la cindroj de l' edzinoj, kiuj vin age perfidis elkreskos floroj flagrantaj, kiel flamo de l' rezina keno. Kiomfoje kaj klamaniere iu el ili perfidis vin, montros al vi la nombro kaj la koloro de floroj. Iru do, kalkuli kaj vi scios la veron.

— Kaj la tomboj de tiuj, kiuj estis fidelaj al mi en siaj pensoj, paroloj kaj agoj? — demandis la reĝo.

— Sur tiaj tomboj elkreskos nenia floro, ĉar la virto eĉ post la morto ne laŭdas sin mem.

— Se estas tiel — ekkriis Itoki, konsiderinte la estintecon — mi estas certa, ke mi trovos nenan floron.

— Faru tion Granda Spirito! — diris la saĝulo. — Sed en tia okazo, memoru, granda Itoki, ke se vi vivos ankoraŭ eĉ tiom da jaroj, kiom vi jam travivis kaj se vi ekvidus iun el viaj edzinoj eĉ en brakoj de alia viro, neniam dubu pri ŝia fideleco.

1) Negroj kalkulas ordinare nur ĝis dek kaj tiun ĉi dekon oni nomigas „tally“. Kalkulinte unu „tally“ ili komencas denove. Ok „tally“ do signifas nombron okdek.

— Tion mi ne promesas — respondis Itoki, kies grizaj brovoj je tia penso hirtiĝis, kiel ĉe sovaĝa kato. — Tion, kio jam pasis, mi estas devigita pardoni, sed tion, kio povas ankoraŭ okazi — neniam. Mi dankas al vi por via konsilo. Via Vento de l' Vero estas vere benata vento, sed mi preferus, ke ĝi surblovu la vivantajn edzinojn, ol la mortintajn.

— Ne estas donita al homo la povo por penetrado de ĉiuj superteraj misteroj — respondis la saĝulo. — Post unu jaro mi revenos. Se vi estos ankoraŭ tiel sciema pri la vero, kiel hodiaŭ kaj se mi sukcesos atingi per preĝado novan manieron por ĝin ekkoni, mi vin volonte instruos. Nun vivu kaj regu trankvile, ho potenca Itoki!

Kaj foriris la fama saĝulo en siajn montojn, rifuzinte akcepton de ĉiuj donacoj, kiuj oferis al li dankema Itoki.

Alvenis atendita tago de la Vento de l' Vero. Ĉiuj irante kovradis siajn okulojn per manplato, kaj multaj ĉirkaŭbandis tute la kapon, aŭ kaŝis sin en loĝejo, ne povante elteni tian doloran pikadon. Itoki matene ordonis al la sklavoj iri tombaran monteton, purigi la tombojn kaj ne forlasi eĉ unu herbeton eĉ unu pajleron. Vespere li sekrete eliris kaj rapidis eksterurben.

Li iris mallevinte la kapon, kun duonfermitaj okuloj, ĉar ankaŭ lin, kvankam li estis justa kaj saĝa, la Vento de l' Vero iom turmentis. Atinginte la plektobarilon el alooj li levis la kapon kaj tuj terura ekkrio eliĝis el lia brusto...

Tuta monteto ŝajnis flami, kiel granda fajrujo. Itoki eksentis flamon en la brusto, en la okuloj kaj li ne sciis, kio lin tiel bruligas: ĉu la doloro, ĉu la kolero, ĉu aliĝita en varmegaj cindroj lia multjara fido, ĉu honto de lia propra malhonoro tiel flame atestita!

Komence li volis forkuri, sed tamen rekonsciigis post unu momento kaj eniris la tombejon iom post iom kutimiĝante al tiu terura brilo, esperante trovi almenaŭ unu solan tombeton, sur kies nuda brusto li povus apogi sian kapon kaj elplori larmojn de doloro kaj de malespero.

Sed tian li ne trovis. Eĉ la tombo de la edzino, kies vizaĝo jam en juneco estis malbeligita, ne donis al li konsolon. Ne kreskis tie flama floro de l' ago, sed tamen estis tiom da blankaj floroj ruste punktitaj, ke Itoki ne sentis forton kalkuli ilin.

Sur ĉiuj aliaj tomboj kreskis floroj de perfidaj pensoj kaj pasideziroj; ruĝiĝis sangaj



floroj de perfidaj vortoj kaj flagris flamaĵoj floroj de l' ago, ĉe kiuj, ĉiuj aliaj ŝajnis palaj kaj etaj.

Malfrue estis kiam Itoki revenis la palacon. Li tuj fermis sin en siaj ĉambregoj tute sola kun sia senlima doloro kaj malĝojo kaj dum dek tagoj nen'un akceptis.

Dekunuan tagon unu el liaj plej konfidaj korteganoj ekkuraĝis eniri lian ĉambron kaj diris:

— Potenca reĝo! Hodiaŭ nokte du viaj edzinoj mortis pro enuo je vi. Ĉu mi devas aranĝi la ceremonion, kiel kutime? Ĉu vi bonvolos solenigi la enterigon per via ĉeesto?

Itoki, kiu dum la lastaj dek tagoj maljunuligis je tiom da jaroj, levis je la kortegano siajn okulojn estingigintajn, sed severajn kaj firmajn.

Ne! — diris li — trioble ne! Kaj kio koncernas la kadavrojn, ĉirkaŭkudru ilin per palmaĵojn alkroĉu ŝtonojn kaj jetu sur la fundon de l' riviero. De nun ĉiuj reĝaj edzinoj estu tiamaniere enterigataj.

Kaj kiam mirigita kortegano foriris, Itoki mallevis la kapon kaj diris al si mem:

— Tie ne atingos ilin la Vento de l' Vero kaj neniu el miaj posteuloj, se alvenos al li mallatinda intenco elŝiri de tomboj la misteron, estos pro ĉi tio punita per malhonoro ka maldolĉeco, kiun mi nun sentas.

Unu jaro forpasis kaj la fama saĝulo venis el montoj viziti la palacon de l' reĝo Itoki, sed tie jam regis lia plej maljuna filo. Itoki jam ne vivis. La saĝulo, eksciinte pri lia morto tre ĉagrenigis kaj kiam li sciligis pri la lasta disono de l' mortinta reĝo, ke la kadavroj de reĝaj edzinoj estu jetataj sur la fundon de l' rivero, li, nenion demandante, foriris, silente admirante saĝecon kaj bonecon de Grandaj Spiritoj, kluj donas al homoj la povon ekkoni nur tiun veron, kiun ili povas travivi.

el pola lingvo  
kun permeso de la aŭtorino  
trad. Czesława Staszewska.

## Saluto al Balkanoj.

(El Penĉo Slavejkov, \* 1860, † 1912 18/vi).

*Kie vi, ho ensorcita  
Koro mia, estas?  
Enuanta, suferanta  
Kor' de mi ne restas.*

*Ne ĉi tie estas mia  
Koro, la malsana,  
Sed ĝi estas tie supre,  
Sur montar' Balkana.*

*Sed vi estas malproksime,  
Balkanaro bela,  
Vi patruja, sankta, kara  
Hejmo subĉiela!*

*Kie ajn mi vage migrus,  
Serĉas koro mia  
Vin, mirinda, vin, gepatra  
Loko familia.*

*Kie ajn en bela lando  
Resti for mi devas,  
Mi de l' koro por ĉi tio  
Dankon ne ricevas.*

*Por mi restas same karaj,  
En kampar', de l' maro,  
Vi, balkanaj, vi, mirindaj  
Montoj kaj tombaro.*

*Korsalutas mi montaron  
Sub la neĝvaloj,  
Vin, kvietaj ebenaĵoj  
Kaj profundaj valoj!*

*Korsaluton al ombrecaj  
Densaj vi arbaroj!  
Korsaluton, bonodoraj,  
Verdaj vi herbaroj!*

*Korsaluton al balkanaj  
Akvoj la argentaj,  
Al ŝaŭmantaj akvofaloj,  
Rapidaĵoj torentoj!*

*Mi salutas vin, dezertoj,  
Rokoj ekoplajn,  
Intermontoj, vi malsekaj,  
Kapoĵ malserenaj!*

*Kie ajn vi estas. ventoj,  
Perflugile venu,  
Kaj kun vi, al mia lando,  
Korsalutojn prenu!*

*Ĉu mi sanas aŭ malsanas,  
Malbenita horo;  
Sole tie, sole tie  
Estas mia koro!*

El lingvo bulgara esperantigis Antoni Grabowski.

A. Asnyk.

**Nie mów!**

*Nie mów! chociażbyś miał zginąć z pra-  
[gnienia,  
Ze wszystkie źródła wyschły już bijące:  
Tyś gonił pustyni piaszczystych złudzenia  
A minął strumień na zielonej łące.*

*Nie mów! chociażbyś umierał z tęsknoty,  
Ze niema czystej miłości na ziemi:  
Tyś pewnie w drodze blask jej rzucił złoty,  
Za ognikami zdążając błędniemi.*

*Nie mów, że wszystko, czegoś ty nie umiał  
Odnaleźć w życiu, marą jest zwodniczą!  
Zdrój czystych uciech innym będzie szumił  
I inne serce poit swą słodyczą.*

**Chór niewidzialny.**

Z Branda H. Ibsena.

*Nigdy człowieku, nie dościgniesz Go,  
Bo z ciała-ś jest stworzony;  
Czy Go ukochasz, czyli zdradzisz Go,  
Jednako-ś jest zgubiony!*

*Nigdy, robaku, nie dościgniesz Go,  
Boś śmierci przeznaczony!  
Czy za Nim pójdziesz, czyli zdradzisz Go—  
Już jesteś osądzony!*

*Nie tóż się! Nigdy nie osiągniesz Go,  
Boś jest wydziedziczony;  
Oflara twoja nie wzbogaci Go,  
Dla ziemi-ś jest stworzony!*

tłom. z esp. M. Cz.

Adam Asnyk.

**Ne dirul**

*Ne dirul se pereus eĉ vi soifante,  
Ke sekigis jam ĉiu fonto akvofala:  
Vi postkuris fantomojn, en dezert' vagante—  
Preterpasis torenton sur verdaĵo vala.*

*Ne dirul eĉ se mortus vi de korsopiro,  
Ke sur tero forestas pura, hela amo:  
Ĝian brilon vi eble jetis dum voj-iro,  
Delogite per falsa erariga flamo.*

*Ne diru, vi, ke ĉio, kion sur viv-vojo  
Vi ne retrovis. — estas trompa iluzio!  
Por aliaj sonbruos hela font' de ĝojo,  
Ĝuigante la korojn per dolĉ-ambrozio.*

esper. A. S. Stankiewicz.

**Ĥa nevidebla horo.**

El „Brand“ de H. Ibsen.

*Neniam, homo, vi similos Lin,  
Ĉar korpo estas vi kreita;  
Ĉu vi Lin sekvos, aŭ perfidos Lin,  
Egale estas vi perdita.*

*Neniam, vermo, vi similos Lin,  
De morto estas vi signita;  
Ĉu vi Lin sekvos, aŭ perfidos Lin,  
Egale estas vi juĝita.*

*Revu!, neniam vi similos Lin,  
Vi estas senheredigita;  
Ofero via ne riĉigos Lin,  
Por tero estas vi kreita!*

trad. Antoni Grabowski.

**Sfinkso.**

Al F-ino K. G.

*Vizaĝo via estas mistera...  
Blanka, senmova, ŝtona, malvarma...  
Mi ĝin neniam vidis kolera,  
Gaja, malgaja, melankolia,  
Ĉiam ĝi estas sensenta ia,  
Sed malgraŭ ĉio — bela kaj ĉarma.*

*Okuloj viaj—karboj brulantaj  
Aŭ diamantoj kun bril' aŭrora...  
Kompreni ilin klopodoj vantaj:  
Rigardesprimo ĉiam alia...  
Jen frosta, fajra, muta, pasia,  
Nepardorema, jen mola, kora...*

*Stranga virino! Kiel diveni  
Vian animon kaj koron vian?  
Tute ne povas mi vin kompreni...  
Vizaĝo via ŝtona, malvarma,  
Rigardo tamen fajra kaj larva...  
— Neeble solvi enigmon tian!*

Kraków.

Juliusz Kries.



## El britaj Kutimoj kaj Moroj.



*Surpavima Artisto.*

En ĉiu lando la enloĝantoj perlaboras sian ĉiutagan vivon en diversaj manieroj, kaj tiujn manierojn decidas iom la kutimoj kaj moroj de l' lando. Mi kredas, ke ekzistas en ĉiu lando personoj, kiuj gajnas siajn ĉiutagajn vivrimedojn — ne en oficejo, aŭ magazeno, aŭ laborante sub la patronado de l' korporaciaj aŭtoritatoj — sed, sendepende, nur per si mem *sur la strato*. (Kompreneble mi ne celas la profesiajn almozulojn, en ĉiu ĉefurbo trovataj.) Tiuj enstratovivantoj luas ilton ialoke por mal-  
 m da kvardekspesoj, kaj ili sin okupas alihore en pluvo, sunbrilo aŭ neĝo, nur sur la strato, ĉar ĝi estas ilia hejmo. Ekzemple, antaŭ kelkaj dekoj da jaroj, oni ofte vidis en Londono (kaj en aliaj anglaj urboj) italajn knabojn kaj junulojn, kiuj ludis sian porteblan stratorgenon, t. e. gurdon. Ili havas nigrajn buklemajn harojn, kaj belajn, nigrajn okulojn,

kies profundeco brilas melankolie pro neniam forgesebla sopirado al bela patrujo. Nun oni nur malofte vidas tiajn italajn gurdudistojn, ankaŭ tiujn, enlandulojn, iom post iom malaperas, ĉar kutimoj ŝanĝas, kaj estas decidataj per novaj cirkonstancoj kaj modoj.

Tre interesa enstratovivanto ankoraŭ ekzistanta en Londono, kiu ricevas sian enspezon kaj vivrimedon de l' preterpasantoj, estas la surpavima artisto. Li estas ĝenerale tre malriĉa viro, kiu havas (aŭ sentas en si) talenton por desegni, sed kiu tamen ne havas la monon lerni aŭ studi tiun arton (kaj kiu sendube ĝin ne studus, eĉ se li tion povus.) Por utiligi sian talenton li do elektas belan lokon sur pavimo, kie la ŝtonplataĵoj estas ebenaj, grandaj kaj blankaj, kaj kie preterpasas kiom eble multaj personoj; precipe do apud stacidomoj, famaj vendejoj aŭ manĝejoj k. c. Li havas kolekton la kraĵonoj multkoloraj, kaj jen, post pripenso de sia temo, li komencas kolore desegni siajn ideojn sur la pavimo. Liaj temoj estas ofte tre diversaj, kaj bonaj aŭ nebonaj laŭ lia imagopovo kaj desegnokapablo. Kelkfoje la figuraĵoj estas tre talente faritaj. Li desegnas ŝipscenon, milito-kampon, politikajn okazaĵojn (kun spritaj rimarkoj de si mem, aŭ kun trafaj aforismoj sube skribitaj), portretoj, ian popularan spritajn aŭ ŝercon, bestojn, fruktojn, florojn — kaj ĉiam lin admiras areto da buboj, kiuj interesplene rigardas lian lertan manon. Poste, kiam li kovris tri, kvar metrojn da spaco, li eksidas sur peco de tapiŝaĉo, metas la ĉapon inverse sur la pavimon kaj pacience atendas donacojn po kelkaj dekspesoj de l' ne tro rapidanta preteriranto (la tro rapidaj ja ne vidas lin). Ofte ili enspezas multon, sed plej ofte nesufiĉe por vivi, kaj ĉiujare oni vidas ilin pli malofte, ĝis iatage la surpavima artisto malaperos, kaj vivos nur en la memoro de kelkaj avoj.

Ad. Ŝofer. Londono.

N.B. — Ne-Zamenhofaj vortoj uzitaj (t. e. netroveblaj en la Universala Vortaro aŭ en ĉia Oficiala Aldono) estas: *inverse, melankolia, patrono kaj populara.* Ad. Ŝ.

## Autuna kanto.

(El Paul Verlaine)

*Dum ĝeme sona  
La violona  
Autuna spir',  
Premiĝas koro  
De monotona  
Sopir'.*

*Iĝante pala  
Ĉe la metala  
Horo-sonor',  
De l' rememoro  
Iras kun ploro  
Mi for.*

*La vento blovas  
Kaj for min ŝovas,  
Kaj estas mi,  
Kiel falinta  
Kaj flaviginta  
Foli'.*

— trad. Antoni Grabowski.

## Nova testamento en Esperanto.

La homo, kiel la maro, havas siajn alfluojn kaj forfluojn de energio, en kiuj li estas kapabla ŝajne la mondon skui, aŭ ne havas forton la muŝon mortigi. Ŝajnas al mi, ke tiaj „forfluoj“ aperadas ĉe ne unu esperantisto, kiam li post longa kaj ofte malagrabla laborado rigardas rezultatojn ne nur siajn, sed ĝeneralajn en la tuta mondo, kaj konstatas, ke la afero ne paŝas tiel rapide, kiel li dezirus, aŭ kiel li imagis.

Mi opinias, ke tia forfluo ne estas krimo kontraŭ la ideo, sed fenomeno tute natura — rezultato de laciĝo, malpacientiĝo; almenaŭ, ĉar mi mem sufiĉe ofte tion spertas, kiel mi penas senkulpiĝi, aŭ al mi tion klarigi.

Sufiĉas tamen ia eĉ plej malgranda instigajo de ekstere venanta, por ke la laciĝo kaj malkontenteco malaperu, por ke komenciĝu denove la „alfluo“, post kiu oni ree alpaŝas kun duobligitaj fortoj al la laboro.

Tian „forflumon de energio esperantista“ mi sentis en la unuaj tagoj de marto, kiam la matena poŝto alportis al mi du sendaĵojn: numeron de „La Revuo“ kaj libreton en Angluj: „Nova testamento“ en Esperanta traduko. Sufiĉe stranga koincido. En „La Revuo“ troviĝas la fino de l' kvara libro de Pentateŭko. Kvar kvinonoj de la penplena laboro de nia Majstro estas jam pretaj; post ses—sep monatoj la ĉefa kaj esenca parto de la grandega verko estos finita. La sanktan libron de Kristanismo ni jam havas.

Kiam mi ekvidis ĉi tiujn du dokumentojn, ekŝajnis al mi, ke kun ili alvenis sankciigo de Esperanto, ĝia „*aprobatur*“ por lingvo literaturo *vere*, sen iu ajn rezervo kaj kontraŭstaro. Mi ne volas paroli pri la ĝenerala signifo de Biblio; ĝi estas konata; ĝian rolon, rilate al Esperanto, klarigis d-ro Zamenhof. Nur je du faktoj mi turnos la atenton.

Kvankam traduko de Biblio estas ĉiam verko de unu aŭ nur kelkaj individuoj, ĝia apero ne estas tamen afero de hazarda volo individua. Ĉiam, en ĉiu lingvo ĝi devas posedi socian fundamenton preparitan, maturan por la akcepto de tiu ĉi verko. Antaŭ tio ekzistas ĉiam nur pli malpli sukcesaj provoj. D-ro Zamenhof komencis Esperanton per komenco de genezo en sia „Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj kompleta lernolibro“. Tamen efektiviĝi sian revon li povis nur post dudek kvin jaroj. Dudek kvin jaroj estis necesaj, por ke la Esperantistaro estu preta akcepti

kaj kompreni Biblon. Kaj kondiĉo de ĉi tiu „preteco“ estas ne la nombro — ni ne bezonas esplori la statistikon, kiom da ni estas en la mondo. Sufiĉas, ke ni *jam bezonis* Biblon, kaj ni ĝin ekposedas! Kun tio estas interne ligita la alia fakto.

La literaturoj de plimulto da eŭropaj popoloj, la literatureco de iliaj lingvoj datumiĝas grandaparte de post la traduko de Biblio. Kiel la plej frapanta ekzemplo sufiĉas germana Luter, aŭ ĉe ni, poloj, — Wujek. Ŝajnas, kvazaŭ per la traduko de Biblio en iun lingvon okazu ĝia bapto je lingvo literaturo, lingvo matura.

Kiel malgranda, monta torento, malaperanta pro sekeco kaj subite aperanta post pluvo, en iu loko ŝanĝiĝas en majestan riveron, ĉiam pligrandiĝas kaj fluas jam per larubando al la komuna kolektejo de ĉiuj riveroj — maro, tiel la lingvo post ricevo de Biblio komencas flui majeste kaj ĉiam riĉiĝante al la komuna oceano de l' homara kulturo. Ĝi jam ne bezonas timi sekiĝon, malaperon.

Esperanto ricevis kaj ricevas Biblon, la sanktan libron de l' duono de homaro. Por tio ĝi eniras, efektive *nur nun* eniras en la vicon de lingvoj literaturaj.

Tiujn ĉi vortojn ne diktas al mi „la dogmoj de blinda fervoro“ aŭ ia sugestliĝo religia. Nenio estas pli fremda al mia menso. Simpla analogio igas min esti certa, ke en Esperanto Biblio ludos la saman rolon, kian ĝi ekludis en ĉiuj aliaj lingvoj.

„La nova testamento de nia Sinjoro kaj Savanto Jesuo Kristo. Londono. La Brita kaj eksterlanda biblia societo. Edinburgo kaj Glasgovo. La nacia biblia societo de Skotlando 1912.“ Jen la titola paĝo. Nenio estas en la tuta libro trovebla la nomo de l' tradukinto. Sed estus granda sendankeco de la Samideanaro, se ĝi ne konus lian (aŭ pli ĝuste iliajn) nomojn. Ilin ni devos same memori, kiel ni memoras la nomon de l' tradukinto de Pentateŭko kaj Psalmaro. Esperantigis la novan testamenton el la greka teksto (de Nestle) Pastro *J. C. Rust*. Lin helpis multe lia edzino kaj s-ro *A. E. Wackrill*, kiu kelkfoje legis kaj ekzamenis la manuskriptojn kaj presprovajojn. Kiel rezultato de illa laboro estas stilo ĉarme, simpla, flua, tia, kian oni

kutime nomas biblia. Legante, oni forgesas, ke oni legas fremdlingvan tekston.

Kia estas la fina rezultato de kritiko pri ĝi, flanke de bibliaj filologoj kaj de ekleziistoj, mi ne scias, ne estante kompetenta pri tio. Versajne ili tra la kriblilon de sia scienco trasemos ankoraŭ kelkajn manketojn. Por ke la traduko ricevu la aprobon de apartaj eklezioj, estos necesaj forstrekoj, trastrekoj, aldonoj. Nenio bona ekzistas sen „tamen“. Sed por la legantoj de la ĉefa literaturajo de l' homaro, avidaj je la viva vorto mem, sen

tiuj forstrekoj kaj aldonoj, la traduko plene sufiĉas, kaj en illaj koroj la nomoj de s-roj Rust kaj Wackrill restos eterne gravuritaj per oraj literoj. \*)

Baroko.

\*) Oni devas ankoraŭ rimarki, ke „La nova testamento“ estas sendube plej malmulte kosta libro esperanta. 613-paĝa volumo bele (ĉar en Anglujo!) presita kaj tolbindita kostas 0,750 ₯. Lede bindita 1,000 ₯.

N. B. Nia redakcio liveras la libron al ĉiu mendinto.

## Pri Estetiko en Medicino \*).

Medicino estas bela, subtila arto gardi kaj konservi belecon kaj harmonion de plej sublima ĉefverko de l' naturo — homo, sana homo.

Kuracisto estas apostolo de tiu nobla homama arto, do li mem estas *sui generis* artisto. Li, kiu sanigon portas, kompaton, trankvilon al suferanta homo, li estas kvazaŭ milda Anĝelo-Gardanto, zorge ŝirmanta per siaj larĝajflugiloj tiun malfortan infanon — senkonsilan, malsanan homon, kiu sin konfide alpremas al la kuracisto, kun espero kredante je potenco de lia saviga scio. Li, perfekte konata ĉiujn sekretojn de tiu komplikita, mistera, dia mekanismo de homa individuo, tenas en siaj manoj vivon de homo, lian trankvilon, feliĉon; li regas absolute korpon kaj spiriton de sia zorgaĉo-malsanulo. Tial kuracisto-artisto devas esti psikologisto, scienculo, poeto, oratoro, diplomato, filantropo, artisto. Kaj tiujn talentojn kreas en li profunda amo al suferanta homo, forto regi sin mem, energio kaj perfekta kono de kuracista profesio.

Kuracisto-estetikisto devas kore konsenti suferojn de malsanulo, devas peni bon-inklini lin per sia simpleco, kvietigi per sia mildeco, regi lin per sia indulgemo, vekti en li plenan al si konfidon. Li devas antaŭ la okuloj eĉ de senespere malsana homo krei belan bildon de lia resaniĝo, montri al li fatamorganon de estontaj tagoj... Pli sane sin sentos la homo malsana, vidante ĉe si tiel amike bonan zorganton.

Ideale bela, estetika konsidero de kuracista profesio vekas en la koro de kuracisto pli grandan amon al la profesio. Ĉiutaga laboro kaj multaj zorgoj ŝajnos tiam pli agrablaj, pli noblaj, ĉar ĉiam pli la kuracisto sentos tiun noblan plezuron: sereneco tiam plenigos la animon de kuracisto, plenigos ĝin tiu ĉarmo kaj sublima sento, kiun oni ne povas klare esprimi — sed por kiu — indas vivi!

(el ataudparolo de la tradukinto).

\*) D-ro Hellodor Świącicki. Pri estetiko en medicino. El pola lingvo tradukis Mieczysław Czerwiński. Warszawa 1913. T.E.K.A. Biblioteko № 1. Prezo 30 Sd; senpaga aldono al „Kuracisto“, Varsovio Szopena 1.

Jen broŝureto, kiu apud la „Konfesoj de l' kuracisto“ de Veresajev, devas esti legata ĉe ĉiu juna homo, intencanta sin dediĉi al medicino. Sed ankaŭ la neprofesuloj devus ĝin ekkoni, por kompreni la veran rolon de l' kuracisto. Ĝi malfermas antaŭ ni larĝajn horizontojn je la iam opiniata „sankta“ arto de sanigado, arto, kiu de la altaĵo de sia sankteco malaltiĝis grandparte ĝis artifiko-metio, ĝi montras, ke la kuracarto ne estas nur monlivera profesio, sed arto inda stari en la sama vico kun skulptarto kaj muziko — kaj same kiel ili malfacila. Ke la aŭtoro estas prava,

tion pravas la ĝeneralaj rilatoj: kiom malmulte da artistoj oni trovas inter la kuracistoj eĉ kiom malmultege da ili konscias sian rolon. Kaj el la kuracatoj? — neniu.

La stilo de l' broŝuro montras, ke la aŭtoro estas ne sole artisto en la kuracado. Legante, oni ekkomprenas ne nur la „estetikon de medicino“, sed ankaŭ ricevas estetikan ĝuon pro la formo de l' verketo. La esperanta traduko, farita de s-ro Czerwiński, ne bezonas laŭdon: ĝi estas samnivele kun la arta verketo.

La libreto estas unua en la kolekto eldonota de la redakcio de „Kuracisto“, oficiala organo de T.E.K.A. Ĝi evidente pravas revivigon kaj vigligon de tiu grava societo, kion oni devas akcepti kun ĝojo kaj deziri, ke la revigligo estu konstanta kaj daŭra. Baroko.



## Vizagoj de homoj dormantaj.

Fragmento de artikolo de s-ro F. Zücher, presita en Münchenn „Kunstwort und kulturwort“.

„Ĉu vi vidis vizagon de via amiko endormiĝinta? Ĉu vi ne ektimis ĝin?...“ diras Nitsche.

Efektive, ĉi tio estas interesa. Ni konas ĉiun sulketon sur vizagoj de niaj amikoj, parencoj; ne evitas nian atenton eĉ plej malgranda ekstremo de iliaj vizagoj, sed ni ne konas esprimojn de tiuj vizagoj, kiam ili dormas. Ni konas aspekton de nia amiko, kiam li estas laca, dormema aŭ ĵus vekiginta, sed ni ne scias kiel li aspektas, dormante. Foje mi gardis nokte malsanan amikon. Li dormis. Malproksimen en la regnon de l' dormo mi iris post lia vizago, kaj observis sur ĝi ĉiujn registrojn de l' animo. Mi estis profunde korduŝita. Tutaj jaroj de ĉiutagaj interrilatoj ne diris al mi pri li tiel multe, kiom diris unu horo da observado de lia dormanta vizago. Venos la dormo — kurteno falos — finiĝas la spektaklo. Ne, tute male, la spektaklo komenciĝas nur post falo de la kurteno, kumpreneble, la dua spektaklo. La okuloj, ĉi tiuj bonegaj ŝajnigistoj, regantaj tage la scenejon de la vizago, kaŝis sin post la kurteno, kien ankaŭ ni povas nun enrigardi. Ĉi tio, kio nun, post sunsubiĝo, prezentigas sur lia vizago, estas sincera, ĉi tio estas riĉa senmaska vero. Malaperis ĉiu gesto, dolĉa rideto, malstreĉigis fieran nemoviĝemon de la vizago, restis sola animo. Aperas ĉio, kio tage estis retenata: kvietaj kaj milda, malgaja aŭ heroa, facilanima kaj vanta, laŭ la ecoj de l' animo.

Dum la tago li estis faranta gestojn de reganto, lia vizago estis ŝtala, nemoviĝema, liaj kunpremitaj dentoj similis aron de hund-

oj-gardistoj — gardistoj kontraŭ malsevereco de lia propra animo. Nun la lipoj malfermiĝis, kvazaŭ gastama pordego, kaj sur la vizago regas bonkoreco.

Dum la tago li estis kontora sklavo, jungita je la jugo, kiu lin premis, sufokis. Nun li estas — ĝusta li: nefleksebla heroo.

Dum la tago li estis promenanta inter vicoj de siaj subuloj kun sulkigita frunto kaj ŝajnigis homon altvaloran, kiu disponas gravajn sekretojn. La dormo forprenis maskon de lia vizago. Ekrigardu lin: li estas vanta kaj senenhava.

Iam mi vojaĝis tra la Italujo. Kontraŭ mi sidis artisto kaj lia edzino. Li parolis altspirite pri sankteco de l' arto, pri ĝia eterne juna sorto: la arto faras maturiĝintan homon denove naiva infano de l' kredo. Ĉion, kion li diris, li stampis per esprimplenaj gestoj, per siaj okuloj kaj per la vizago. Lia edzino silentis. Mi kompatis la bedaŭrindan artiston, kiu havis tiam mutan, neintelligentan kunulinon. Fine ni, lacaj, ĉesis interparoli. Estis varmego kaj miaj kunvojaĝantoj ekdormis. La dormo mallalte prenis de sur liaj vizagoj vua'on de mensogo. La kapo de l' artisto desoviĝis de la kuseno, lia larĝa buŝo malfermiĝis malsaĝeco, el ĝi elstaris grandaj flavaj dentoj, la vangoj kaviĝis. Min teruris la ĉifoneco de ĉi tiu vizago. La vizago de lia silentema edzino estis serena kaj dolĉa.

Laŭ „Gazeta Warszawska“  
esperantigis X.

## Scienco kaj vivo.

### Kosto de la preseraro.

Antaŭ ducent jaroj, angla libristo publikigis Biblion, en kiu troviĝis bedaŭrinda preseraro. La sepa ordono estis tiel presita: „Ci deziregos la posedajon de cia proksimulo.“

Kiam nune okazas tia preseraro, la eldonisto aldonas klarigan noton kaj petas senkulpigon de la leganto. Sed estis tute alie antaŭ du jarcentoj.

La malfeliĉa eldonisto estis alvokata antaŭ la aŭtoritatojn, kiuj severe riproĉis al li, ke li konsilis ŝteli la posedajon de la aliaj, kaj kondamnis lin je monpuno 7500 frankoj, sumo grandega en tiu epoko.

Plie, la ekzempleraro estis detruiita.

Tamen restis unu ekzemplero, kiu troviĝas

nune ĉe la „British Museum“, en Londono, kaj kiu estis elmontrita antaŭ ne longe, okaze de la 300-a datreveno de la traduko de la Biblio en la anglan lingvon. „La Mov.

### La bonaj maneroj.

Diversmaniere komprenas la bonmaniercon niaj malproksimaj kunfratoj.

La polinezianoj, por montri altan respekton al tiu kun kiu ili parolas, sidigas.

La enlandanoj de l' insulo Malikolo, volante esprimi sian admiron surdige fajfas. Eskimo, intencante fari plezuron al sia kunparolanto, aŭ esprimi komplimenton, tiras lin je la nazo. Ĉerko estas konsiderata de Ĥinoj, kiel plej konvena donaco por maljunulo.

**Ĥina legendo pri deveno de teo.**

Oni opinias, ke teo malhelpas dormon. Ĥinoj rakontas, ke iam en Ĥinujo vivis la homo favorata de dioj. Li por glori ilin senĉese decidis tute ne dormi. Tiacele li detranĉis siajn palpebrojn kaj jetis teren. El la palpebroj elkreskis arbusto de teo, kiuj tial havas econ malhelpi dormon.

**Ĉu estas utile trinki akvon dum tagmanĝo?**

Jen estas grava higiena demando. Antaŭe oni opiniis, ke trinkita akvo haltigas digeston. Du amerikaj kuracistoj Nattil kaj Hank funde esplorinte pruvis, ke akvo ne malhelpas, sed kontraŭe helpas digestadon pli rapidigante ĝin. Same opiniis niaj praavoj. Iafoje la scienco antaŭenirante—returniĝas.

## Konsideru!

(EL JEROME K. JEROME.)

Sur oceano de la vivo ĉiu devas mem direkti sian direktilon kaj neniu povas doni al ni helpon aŭ konsilon, ĉar neniu konas kaj neniam konos vojon tra la senfina oceano. En la ĉielo super ni brilas la suno, nokte ekbriliĝas la steloj, kaj laŭ ili, supren levante la okulojn, ni direktas niajn ŝipojn kaj, Dio gardu nin!

La maro de la vivo estas tre profunda kaj neniu scias kie estas ĝia fundo, kaj kiaj rokoj sin kaŝas en ĝi, kaj ankaŭ tion, kiaj fluoj sin trovas sub ĝia trompa kaj glata supraĵo: malprofundaĵoj en ĝi eterne alilokiĝas, defluoj kaj alfluoj estas nekonstantaj kaj oni ne povas firmigi la karton por la ŝipoj sur ĝi naĝantaj.

La maro de la vivo estas larĝega, senlima kaj neniu konas ĝiajn bordojn. Jam multajn miljarojn ŝatmas kaj bruas ĝiaj ondoj kaj tagon post tago el post la nebulo elnaĝas la ŝipoj kaj preternaĝas kvazaŭ mir-aperoj, ŝvingante per veloj; neniu scias de kie ili venas, neniu scias, kie ili malaperas. Al ĉiu ŝipo destinita estas nekonata al ĝi maro, kaj ĝi kuras tra la ondoj en la landon nekonatan kaj neniu povas diri kie troviĝas tiu ĉi lando.

Kaj maristoj tranagiĝintaj antaŭe ol ni! Kiu ili estas, por ke ni povu sekvi ilin? Nur unu tagon eble balanciĝis ilia ŝipo sur la ondoj; nur unu horon eble ili vivis en la boato de l' tempo: momento — kaj senĉesa fluo forportis ilin, potenca vento forpelis ilin malproksimen kaj jen ili jam malaperis en netravedebla malumo; kaj neniu el ili reen venis kaj neniu vidis ilin eĉ unufoje, nek, ilin nek la kadukan ŝipon, kvankam la okuloj, tra la varman larmon, akravide rigardis en la maran nebulon. Glatiĝis la akvo post ili kaj nek postsigno restis sur la senlima maro. Ĉu ili povas desegni la karton de tiu oceano, ĉu ni povas fidi al ili!

Kion ili vidis en la potenca maro, krom ondoj furioze sultantaj ĉirkaŭ ilia ŝipo? Ili ne konis kaj ne konas sian vojon; ili ne konas havenon, al kiu ili naĝas; nokte forŝiriĝis la ankro de ilia ŝipo, kiu libere ekkuris antaŭen kaj enfalis en la maran abismon kaj ili jam neniam ekvidos lumturojn.

Sufiĉas tralegi la taglibron de ilia mallongedaŭra vojaĝo, kie ili priskribas la danĝerojn kaj terurojn, kiujn suferis ilia ŝipo; sed iliaj mezuroj de la senfunda maro, iliaj kartoj de neniam viditaj bordoj, — ja ili valoras ne pli ol enigmoj, al kiuj ŝlisilo estas perdita! Ĉu desegnas talpoj mondo-kartojn por orientiĝo de aliaj talpoj?

De kiam nia tergloba turniĝas, ni predikas, prelegas, aranĝas krucajn militirojn, verkas pamfletojn, bruligas homojn sur brulstiparoj kaj reciproke konsilas al ni kiamaniere trafi en ĉielon; ĝis nun nin turmentas la demando kaj nun ni same estas kunfuzitaj, kiel antaŭe kaj neniu scias, kiu estas prava, sed ĉiu el ni estas forte konvinkita, ke ĉiuj aliaj eraras.

Kaj ni krias ĉiu pri sia opinio:

— Jen estas la sola vojo al la saviĝo sekvu nin, se vi ne volas pere!

— Ne sekvu lin! Kun li vi perdos la vojon, — vokas dua. — Nur mi konas la vojon!

— Ne, ne, vi gardu vin de tiuj du, — diras la tria, — jen la vojo! Ĝus mi ĝin trovis. Ĉiuj vojoj, tra kiuj oni iris ĝis nun, kondukas al pere; sed nun mi trovis la ĝustan vojon, vi sekvu min!

En unu epoko, per fajro kaj glavo kaj per ne malpli konvinkantaj rimedoj, ni enlasas homojn en la paradizon tra unu pordego, kaj dum venonta generacio, furioze ni forpelas homojn de tiu ĉi pordego; evidentigis, ke tiu pordego ne estas vera kaj kondukas al pere kaj tiam ni pelas la homojn tra alian vojon.

trad. M.

## El Esperanta Mondo.

### KONGRESOJ.

#### VI Brita Esperantista Kongreso.

Tiu kongreso okazos en Eastbourne, bel-ega marurbo, dum Pentekosto, 11 — 12 de Majo.

La urbo eldonis specialajn ilustritajn gvidlibrojn en franca lingvo; por ricevi ĝin oni skribu al s-ro Nix, 2, Terminus Road, Eastbourne.

Por sciigoj, aliĝoj, sin turni al s-ro Souchay, 134, Bd Exelmans, Paris (aldoni poŝtmarkon por la respondo).

#### II Universala Kongreso de Spiritistoj.

Tiu kongreso okazos en Genevo de l' 11 ĝis la 14 de majo 1913.

La komunikoj povos esti redaktitaj en franca, angla aŭ esperanta lingvoj aŭ resum-

itaj en unu el tiuj tri lingvoj. Adreso: s-ro A. Pauchard, 23 rue Tronchin, Genève (Svisujo).

#### Sporto provas Esperanton.

Ni ricevis el Rusujo la jenan informon kaj alvokon:

Direktoro de semajna ilustrata gazeto „Sporto kaj Ludoj“ (Kiev, Rusujo) decidis havigi al si eksterlandan kronikon *ekskluzive per Esperanto*.

Samideanoj, tuj, kiam en via regiono okazis aŭ estas preparata iu sporta afero, priskribu ĝin mallonge kaj sendu al V. Tračevskij, B. Podvalnaja 25, Kiev (Rusujo). Se la sendaĵo estas ĉerpita el gazeto, oni citu ties nomon kaj daton.

Konsideru la propagandan signifon de tiu fakto kaj tion, ke plej valoraj komunikajoj estos rekompencataj.

## Fakty.

### Esperanto na Wschodzie.

Dziennik japoński „Nichi Nichi“, wychodzący w Tokio, zawiadamia, że liczbą członków Związku esperantystów japońskich wzrasta ciągle i że prof. Kroita, jako jego prezes, prowadzi kursy Esperanta pod protektoratem Ministra komunikacji. Oprócz tego wielu agentów policyjnych uczy się jęz. międzynarodowego.

### Esperanto w strefach podbiegunowych.

Jeden z korespondentów „The British Esp.“

donosi, że niedawno otrzymał radiotelegram po esper. od swego brata, który przepędza zimę z dwoma kolegami Norwegami na Spitzbergu; zaczął się on uczyć Esp. w październiku r. z.

Wysyłający telegram przebył przestrzeń 150 kilom. na „ski“ aby się dostać do pierwszej stacji radjotelegraficznej.

Jest to zapewne pierwsza depesza esperancka, wysłana z tych stron odległych.

## Varsovia movado.

### Pola Esp. Societo.

— 9-an de k. m. estis okazonta jara kunveno de P. E. S., sed ĝi ne okazis pro ne sufiĉeco de alvenintaj membroj.

— La kunveno decida okazos 24 de Aprilo, la membroj estas petataj alveni plej multe nombre.

— Pola Esp. Societo donace ricevis de la membro, S-o Matuszewski, kelkdek volumojn de esp. libroj por la biblioteko de la societo. La komitato esprimas al S-o Matuszewski plej koran dankon.

— Ke Esperanto lastatempe disvolviĝas en Polujo pruvas la fakto, ke unua eldono (1000 ekz.) de tre bona esp.-pola vortaro de

S. Czarnowski estas tute elĉerpita. Dua eldono de tiu utila, ĝis nun plej granda esp.-pola vortaro, eldonita kiel 15 volumo de „Komerca Biblioteko“ estas tute kontentige disvendata. Oni povas ricevi ĝin en nia administracio po 75 kop.

— En Varsovia Universitato ekzistas agema esperanta grupo. Oni klopodas por oficiala malfermi studentan rondeton de esperantistoj. En studenta legejo estas troveblaj kelkaj esp. gazetoj, abonataj per kolektita mono. Ark. Aŝ.

— 27-an de Aprilo okazos en salono „Orion“ koncerto kun esperanta parto (prelego, kantoj, deklamoj). La koncerto estas organizata ekster la sfero de agado de Pola Esp. Soc.



## Korespondajoj.

Lwów.

La societo Esperanto en Lwów aranĝis la jaran ĝeneralan kunvenon la 25 de februaro k. j. estis elektita sekvanta komitato: Prezid. d-ro I. Fels, I-vicprez. advokato V. Unger, II-vicprezid. d-ro J. Gerstler, sekretarioj f-ino L. Weller k. senatano Wierzchowski, kasistino s-ino S. Leser, bibliotekistino f-ino E. Einschlag, komitatanoj s-roj Schnitzer, s-ino Fels, f-inoj Latz k. Brandes.

La societanoj kunvenadas lunde kaj merkrede en klubejo (Rynek 9) kaj sabate en kafejo Sans Souci.

Ĉiun lundon d-ro Fels gvidas esperante amaran kurson por la membroj kaj merkrede okazas paroladoj, diskutoj kaj legadoj. Ĝis nun parolis d-ro Fels pri propagandaj rimedoj por Esperanto, s-ro Schnitzer pri memkapableco kaj d-ro Gerstler pri organizado de Esperanto. Ĉiam sekvas vigla diskuto. En klubejo ĉiuj societanoj devas paroli ekskluzive esperante kaj precize obeas tiun ĉi aranĝon. Eĉ en la kafejo, kie flirtas esperanta standardo, dum ekskursoj kaj promenoj, ni parolas inter ni sole esperante. Aktivaj anoj estas nun 48. Senatano Wierzchowski gvidas en la klubejo esperantan kurson. Entute la esperantismo fariĝis ĉe ni populara, ĉiuj scias pri ni, laŭdas kaj aprobas nian ideon, sed esperanto devus esti malpli laŭdata, sed pli lernata kaj ekzercata.

D-ro J. Fels

Plotrków.

Ĝenerala kunveno de nia societo okazis 27-an de pasinta monato. Malfermis kunvenon prezidantino s-ino M. Rożanowiczowa, post

kiu por prezido estis elektita per aklamado s-ro Vogel.

Traleĝita jara raporto montras, ke la societo ne rapide, sed konstante progresas, kalkulante nun 58 membrojn, el kiuj 26 partoprenis en la kursoj, 2 estis diplomitaj. Posedaĵo de la societo valoras ensume Rb. 101,50.

Baloto de la komitato donis jenan rezulton: prezidanto — s-ino Marja Rożanowiczowa, vicprezidanto — s-ro Roman Vogel, sekretario — s-ro Władysław Mielczarski, kasisto — f-ino Janina Świerczyńska, komitatano por scienca fako — s-ro d-ro Karol Rother, komitatano por nekonstantaj enspezoj — s-ro inĝeniero Wincenty Wujciński, komitatano por propaganda fako — s-ro Wacław Truchliński, loĝejmastro — s-ro Józef Struski, kandidato — s-ro Stanisław Chruścielski.

Revizia komisiono konsistas el s-inoj J. Chojnowska, J. Sikorska kaj s-ro Z. Flakiewicz.

30-an de marto loka Muzika Societo aranĝis en sia salono varietean prezentadon. Esperantistoj, por akcenti sian ekzistadon, okupis grandan tablon, sur kiu estis grandlitere skribita: „Tablo esperantista.“

Kompreneble multaj personoj ekinteresiĝis pri nia societo kaj lingvo, des pli, ke nia „tablo“ disdonis efikajn propagandilojn de s-ro Günther.

Antaŭ nelonge nia prezidantino aranĝis en sia salono raŭton. Konata, vere pola gastameco de nia prezidantino, sufiĉe abunda literatura programo (kanto, deklamo, fortepianoludo), faris, ke 24 kunvenintaj anoj gaje amuziĝis ĝis malfrua nokthoro.

Baldaŭ ĉe nia societo fondiĝos konstanta drama rondeto, kiu ludos ĉiumonate polajn kaj esperantajn teatraĵojn.

B.

## Pri U. E. A.—jarlibro.

De multaj legantoj ni ricevis indignoplenajn protestojn kontraŭ tute nekomprenebla kaj *netolerebla* forlaso, farita en U.E.A.—jarlibro, por 1913 jaro.

Nome, ni ne trovas eĉ unu vorton pri ekzisto de poloj, kvankam tiu nekonata al kunlaboranto de U.E.A. nacio, kalkulanta 23 milionojn, el kiuj pli al 11 milionoj vivas sub rusa regado estas pli multenombra ol: belgoj, danoj, bulgaroj, bohemoj, grekoj, hispanoj, nederlandanoj, norvegoj, rumanoj, serboj, svedoj, svisoj.

k.t.p. kaj multaj ceteraj nacioj, kiujn afable citas U.E.A. jarlibro.

En la fako — Rusujo — sub kies sceptron politike vivas, ni legas:

„Legantoj: — 135,398,000. (Finlando: 3,059,000) Azia Rusujo: 28,900,000. Nacioj: Grandrusoj 67 milionoj; malgrandrusoj 25; blankrusoj 6,2; hebreoj 5,8; kirgizoj 4,7; tataroj 4,2; finnoj 2,5; baŝkiroj 1,6; litovoj 1,3; armenoj 1,3; moldvanoj 1,2; mosdvanoj 1; estoj 1; diversaj 3.“

Sed kie estas pli ol 11 milionoj da popoloj, ni demandas? Ni ne volas supozi ian malbonintencon, sed nur eraron de la aŭtoro de tiu statistiko, *polo*, S-o Ŝabuniewicz.

Cetere, la statistikaj ciferoj de la nacioj, kune ue egalas la ĝeneralan sumon; ankaŭ okazas io nekompreneblajo.

Ni kredas, ke tiun korekton faros U.E.A. en sia organo, ĉar tia facilanima malprecizeco igas nin ne kredi je statistikaj ciferoj de U.E.A.-jarlibro.

Allaj gazetoj estas petataj represi.

La Red.

## Bibliografio.

**D-ro J. B. Marchlewski. Ekonomio Socia.** Kio ĝi estas kaj kion ĝi instruas. Laŭ la pola eldono esperantigis Emilo Pfeffer. Krakovo. Esperanta scienca kaj literatura Libraro. 1912. paĝ. 68. Prezo 10 Sd.

La konsidero, ke nia esperanta bela literaturo rapide disvolviĝas, sed la kampo de scienca populara literaturo restis ĉe ni tute malzorgata kaj nekulturata, inspiris la krakovan esperantan eldonan societeton de s-roj Kronenberg, Pfeffer kaj Czubyński al la laŭdinda entrepreno, plenigi tiun ĉi mankon. Ĉiu, kiu dezirus ekkoni la principojn de la grava moderna scienco pri Ekonomio socia, volonte salutos la bonegan verketon de d-ro Marchlewski. La malalta prezo, prezentanta nur la preskostojn, plifaciligos la disvastigon de la utila kaj interesanta libreto.

A. G.

**La kantoj de Salomono.** Libro el la Biblio. El la hebrea lingvo tradukis I. H. Fred. Edinburgh (Skotlando): Ĉe la tradukinto, 14 A Bristo Place. Paĝoj 36. Prezo 20 Sd. Aŭfrankite.

La kantoj de Salomono pri sia bela, nigreta amatino Ŝulamit prezentas la plej ĉarman lirikan libron de la Malnova Testamento, kaj ili ne ĉesas inspiri la modernajn tutmondajn poetojn al perifrazoj per rimoj kaj ritmoj.

La tradukinto lasis al la „Nigretulino“ la simplan vestaĵon de l' originalo, per tio neniel malpligrandigante sian poezian ĉarmon. La ekstera flanko de la eldonaĵo estas eleganta kaj bongusta.

A. G.

**Felix Ortt. Al mia fratino.** Letero pri la seksvivo. Tradukita de A. Muller. Eldonejo „Chreestarchia.“ 1912. Soest (Nederlando). Paĝoj 31. Prezo fl. 0,50 = 0,400 S.

La klerigo de la junularo pri la seksa vivo estas temo, kiu serioze okupas en la lasta tempo la instruistaron kaj la gepatrojn. La

opinioj ankoraŭ diferencas en la detaloj, sed oni konsentas pri tiu punkto, ke lerte kaj ĝustatempe donitaj indikoj povas antaŭgardi la junularon de gravaj danĝeroj.

La aŭtoro traktas la malfacilan kaj delikatan kvestion serioze kaj kun talento, kiu ebligas al li klerigi la knabinon pri la esenco de la seksa vivo kaj ĝiaj danĝeroj, ne oferante sian hontemon. El ĉiuj paĝoj de la lerte tradukita libreto vidiĝas la nobla intenco de moraliga averto.

A. G.

**La artefarita „Altmontarsun'-bano.“** Nova kuracmetodo de d-ro med. Breiger, Berlin, fakuracisto por fizikaj kuracmetodoj kaj lumterapio. 1912. Ader & Borel. Esperanto-Verlag. Dresden-A 1, Struvestrasse 40. Paĝoj 18. Prezo 0,200 S.

Kiel pravas la Teka (Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio) kaj ĝia revuo la „Kuracisto“, la kuracistoj apartenas al sciencaj fakuloj, kiuj plej facile komprenas la ideon de lingvo internacia kaj plej volonte akceptas la potencon ilon, kiun al ili liveras Esperanto. La libreto de d-ro Breiger montras unu el la praktikaj aplikoj de nia lingvo por disvastigado de ĝenerale utilaj ideoj kaj metodoj. Ĝi priskribas la sciencajn fundamentojn de grava nova kuracmetodo kaj la mirindajn sukcesojn, kiujn ĝi atingas. Per si mem tre interesa, ĝi ankoraŭ pli meritas la atenton de suferantoj.

A. G.

**Edmond Privat. Karlo.** Facila legolibro por la lernado de Esperanto. Kvara eldono entute represita laŭ la originala manuskripto. Dekdua milo. Universala esperantia Librejo. 10, Rue de la Bourse, Genève. 1912. Paĝoj 36.

Kiel, en niaj cirkonstancoj, grandegan sukceson havis la bonega libreto de s-ro Privat, montras jam la titolo. La nova eldono

KAŻDY NOWY ABONENT „ESPERANTYSTY POLSKIEGO“ — TO KROK  
NAPRZÓD W ROZWOJU NASZEJ SPRAWY NA ZIEMIACH POLSKICH.

estas pligrandigita per unu tuta ĉapitro kaj sur ĉiuj paĝoj per multaj frazoj antaŭe nepresitaj.

A. G.

D-ro Andreo Fiŝer. Esperanta legolibro por lernantoj. Internacia krestomatieto. Dua eldono korektita kaj kompletigita. Tiflis, Presejo „Esperanto“, Elizabet-str. № 17. 1913. Paĝoj 116. Prezo S 0,300 (30 kop.).

Ĝenerala estas la plendo ĉe la esperanta eldonistoj, ke la esperantistoj malmulte legas librojn kaj ankaŭ malpli ilin aĉetas. Libro (krom gramatikoj kaj vortaroj), kiuj atingas duan aŭ eĉ trian eldonon, apartenas ĝis nun al esceptoj. La cirkonstanco, ke la verketo de d-ro Fiŝer aperas sufiĉe frue en dua eldono, atestas, ke ĝi apartenas tute merite al ŝatataj legolibroj de la komencantoj. La dua eldono estas kompletigita per verketoj de nia Majstro kaj de aliaj bonstilaj aŭtoroj esperantaj. Tute prave d-ro F. aldonis en la dua parto de la libreto la plej gravajn dokumentojn, koncernantajn la esperantistajn kongresojn kaj la internan ideon de Esperantismo.

A. G.

Lermontov. Novaj Versaĵoj. Tradukis el la rusa lingvo Bela Manto. Paris. 1013. Presa esperantista Societo. 33. Rue ; Lacépède. Paĝoj 92. Prezo ne dirita.

Ĝis nun la granda rusa poeto havis tradukantojn de kelkaj siaj poemoj en Belmont, Devjatnin, seleznev kaj aliaj, sed jen aperas tuta antologio da liaj poemoj, 32 belegaj versaĵoj en eleganta libra eldono de la Presa Esperantista Societo. Liveri tute bonajn poeziajn tradukojn estas malfacile. La tasko ankoraŭ plimalfaciliĝas, kiam oni donas, anstataŭ unu versaĵon, tutan aron da ili, diferencaj laŭ formo kaj agordigo. — Mi ne scias, kiu kaŝas tiel zorge sian nomon sub la pseŭdonimo, sed ĉiuokaze iu, kiu ne nur estas Bel-amanto, sed Bel-scipovanto. Li regas la poezian formon bonege kaj scipovas eĉ imiti ritmojn, kiuj pro la diferenco de la akcentado en lingvo rusa kaj esperanta, estas tre malfacile transdonablaj esperanten. Sed ankaŭ la senco estas plej ofte tre ĝuste interpretata, do la legado de tiaj tradukoj estas vere kontentiga. Ni povas gratuli la maskitan nekonaton.

A. G.

## Revuo de la gazetoj.

### THE BRITISH ESPERANTIST.

#### Artefarita Lingvo.

Neniu ekzistanta lingvo estas tiel simpla kaj facile lernebla, kiel artefarita lingvo povas esti. Ni ne trovas niajn plej bonajn laborilojn en la naturo, pretajn por niaj manoj; ilin ni devas elpensi kaj fari; kaj tiel ankaŭ estas, rilate al la plej bona instrumento por la esprimo de niaj pensoj. Sekvi la malvovigadon kaj rilatojn de natura lingvo estas esploro in-esplena: ĝi estos neniel malhelpata de ia generala alpreno de lingvo internacia artefarita. Estas loko kaj utilo por ambaŭ. La herbejo kaj la dense plektita arbaro havas pli da beleco, kaj pli da intereso por la naturisto, ol niaj kampoj kaj dornobariloj kaj plantejoj. Sed la utileco ankaŭ postulis sian parton de l' tera supraĵo. Tiel ankaŭ iu artefarita orda lingvo povas, por bono de l' homaro, okupi lokon apud la mortintaj kaj vivantaj lingvoj, el kies libera kreskado rezultis tiaj malsimplaĵoj kaj senregulaĵoj, ke ili fariĝis ne nur malfacile lerneblaj, sed neperfektaj instrumentoj por sia ĉefa celo.

#### LINGVO INTERNACIA.

La fundamentoj de nia lingva sintenado:

„... Esperanto ekzistas per si mem. Ĝi ne estas „kritiko“ de la naciaj lingvoj, kvankam

ilin ĝi superas dank'al sia facileco. Sed se iam niaj gramatikoj fariĝus tiel dikaj, kiel la nacilingvaj, kaj niaj radikaroj tiel riĉaj kaj multvortaj, kian *praktikan* superecon ni do konservus?

Nia Esperanto estas antaŭ ĉio difinita por la modesta homaro, kiu estas la pli multnombra kaj ĝin nepre bezonas. Perdante tian indecon, ĝi perdus samtempe sian gravan *socian* signifon, kaj, vere, sian ekzistkialon. Tute ne sufiĉas al ni, ke la internacia lingvo ludu en la estonta socio la rolon de la latina lingvo en la mezepoko inter kleruloj. Multe pli alten, pli vasten, pli profunden ni celas. Ne simple lingva aŭ scienca estas la demando — kvankam nur lingvo estas Esperanto — sed por ni esence *socia*. Jen kial ni timas kaj kontraŭbatalas ne la *naturan* progreson kaj evoluadon, sed ĉian artan — vere teoriantan kaj kontraŭnaturan — rapidan, ununacian pliriĉigon, kaj restas sensanceliĝe fidelaj al nia eĉ modesta, eĉ malriĉa, sed por *ĉiuj* homoj, por *ĉiuj* klasoj, por *ĉiuj* popoloj, kiel eble plej facilakirebla internacia fundamenta lingvo“.

#### LA REVUO.

La tuta mondo, la grandaj societoj kaj Institutoj, la ĉefaj korporacioj, la diversaj registaroj nur tiam fine akceptos Esperanton, kiam ni povos certigi kaj pruvi, ke nia lingvo estas kapabla ĉion esprimi, kion povas espri-



mi ĉiu lingvo de altgrade civilizita nacio, kun la sama klareco, precizeco kaj certeco. Ni Esperantistoj scias ĉiuj, ke nia vulgara simpla lingvo estas perfekte bona; ni scias, ke jam pli-malpli ĝuste, pli-malpli plene, oni povas ĝin uzi en ĉiuj fakoj de la homa scio. Sed tamen ni ankaŭ scias, ke ofte mankas bone difinita termino, ke multaj objektoj, aferoj, iloj, eĉ tre ordinaraj, ne havas ankoraŭ en Esperanto nomon. Se ni atendas por tion ricevi, ĝis kiam la esperantista „popolo“ ilin bezonos, ilin kutime kaj ripetite uzos, ni ĉiuj, niaj filoj kaj eble eĉ niaj nepoj estos jam de longe mortintaj, antaŭ kiam Esperanto estos vere preta por ĉiuj servoj.

Komparo inter Esperanto kaj nacia lingvo ne estas nun ebla, ĝi povos nur tiam esti tarita, kiam nia Akademio al ni prezentos lingvon tiel kompletan, kiel estas la franca, la angla aŭ la germana.

Mi do, unu fojon pli, rekantos mian *leitmotiv*: La Akademio laboru!

Mi scias, ke kelkaj ne akceptas la ideojn, kiujn mi pledas, ĉar ili timas, ke, se la vortaro multe plivastiĝos, Esperanto *perdos sian tutan simplecon* kaj fariĝos lingvo tiel komplika, kiel unu el la naciaj lingvoj.

Tio estas grava erarol!

El kio konsistas la *simpleco* de lingvo? Ĉu el malmulthava vortaro? Ĉu el regula kaj facila gramatiko?

Kio igas la lernadon de la franca lingvo, ekzemple, tiel malfacila? Ĉu la lernotaj vortoj? Ĉu la terure malsimplaj, mallogikaj kaj strangaj gramatikaj reguloj?

La respondo ne estas duba: la tuta malfacileco de la franca lingvo devenas nur de la malreguleco kaj malsimpleco de la gramatiko.

Cetere ĉu iu ajn aŭdacus aserti, ke por *scii* lingvon oni devas koni la tutan vortaron de tiu lingvo? Ĉu ekzistas iu Franco, kiu konas (mi eĉ ne diras: *scias*) ĉiujn vortojn de la franca lingvo? Li venu kaj prezentu sin al la publiko, ĉar li estas montrinda fenomeno!

La kutima vortaro de la franca kampanaro konsistas proksimume el *mil* vortoj, dum fakte pli ol tridek mil vortoj estas nun uzataj en mia patra lingvo. Ĉu iu aŭdacus aserti, ke franca kampanaro ne scias la francan lingvon? Klera Franco apenaŭ uzas kvar mil diversajn vortojn; kaj, se mi ne eraras, la vorttrezoro de Théophile Gautier, la plej vortriĉa franca aŭtoro, ne enhavas pli ol dek mil vortojn. Ĉu pro tio, ke troviĝis en la franca lingvo eble dudek mil ofte uzataj vortoj, kiujn Théophile Gautier ne konis aŭ ne uzis, oni povas diri, ke li ne *sciis* la francan lingvon?

La afero estas ja tre klara: la longeco, pleneco de la vortaro de iu lingvo neniel influas ĝian facilecon. *Ĉiu lernas nur tiajn vortojn, kiujn li bezonas*. Se mi lernas Esperanton nur en celo ĝin uzi por vojaĝoj kaj ordinaraj korespondoj aŭ konversacioj, sufiĉ-

os, ke mi konu ses- aŭ sepcent radikojn, kaj kvankam mi konas nur tiujn sepcent radikojn, neniu povos diri, ke mi ne scias Esperanton tial, ke mi ekzemple ne konas la nomon esperantan de iu eĉ tre ordinara kuirilo, kies nomon cetere mi eble ne konas en mia patra lingvo!

Estas ja stranga manio, ke oni ĉiam volas postuli de Esperanto pli, ol de ĉiu nacia lingvo. Kial, *por scii Esperanton*, estus necese, ke mi konu la esperantajn nomojn de miloj da aferoj, kiujn mi ne scias nomi en mia patra lingvo?

Tamen estas urĝa neceso, ke tiuj aferoj, kies nomojn mi persone ne bezonas, havu tamen esperantan, interkonsentitan, difinitan nomon, ĉar, se mi ne bezonas ilin, aliaj personoj ilin bezonos, ĉu hodiaŭ, ĉu morgaŭ.

Mi nun ne volas pli longe paroli pri tiu ĉi lingva temo; tamen la demandaro ne estas elĉerpita, kaj mi ricevis, precipe el Germanujo, tre interesajn leterojn pri *la plej bona metodo* por kompletigi nian esperantan vortaron. Mi pri tio reparolos en mia proksima Babilado

Carlo Bourlet.

#### ALIAJ RICEVITAJ GAZETOJ:

Amerika Esper., Antaŭen Esperantistoj!, Aŭstria Esp., Belga Esperantisto, Bulletin Mens. d' Inform., Ĉasopis Ĉeskych Esper., La Dek-Sepa, Esperanto, L'Esperanto, Espero Katolika, The Esperanto Monthly, Germana Esperant., La Holanda Pioniro, Internacia Pedagogia Revuo, Juna Esperantisto, Kataluna Katoliko, La Kulturo, Lingvo Intern., La Marto, Mitteilungen, Le Monde Espérantiste, Monda Poŝto, La Movado, Nederlanda Katoliko, Norvega Esperantisto, Normanda Stelo, Oficiala Gazeto, Orienta Azio, La Ondo de Esper., Paris-Esperanto, Portugala Revuo, La Revuo, Sarta Stelo, Scienca Gazeto, Svisa Espero, Ŝvaba Esper., Le Travailleur Esper., Tutmonda Espero, Universo, Ukraina Stelo, Vekiĝo, La Verda Standardo.

#### NOVAJ GAZETOJ:

14) *La Espero*, monata, svede-esp. Red. 3—23, Gefle Svedujo; jare 1,00 ₰.

15) *Ĥina Socialisto*, ĉiusemajna revuo Ĥina kaj Esp.; Red. — № 1 An-lan Ro., Ŝanhaj, Ĥinlando; jarabono 2 ₰.

Ni rekomendas tiun tre efektan gazeton, presitan Ĥine kaj esperante.

16) *Espero Teozofia*, revuo de la Teozofia Esper. Ligo. Red: 145, B-d Malesherbes, Paris, jarabono kun aliĝa kotizo 1 ₰.

# Obszerny Słownik Esperancko-Polski

zawierający około 7000 pierwiastków i słów pochodnych

ST. CZARNOWSKIEGO

Z dodaniem artykułu o Esperancie i gramatyki w wydaniu II-im wyszedł jako № 15 „Bibl. handlowej“

Do nabycia w Administracji Esper. Polskiego

CENA 75 KOP.

## La Movado

Monata Universala Gazeto por propagando,

Informo, Komerco k. t. p.

FRANCE kaj ESPERANTE

Jarabono 1.30 Sm.

Redakcio kaj Administracio 61, B-d S-t Marcel, Paris

Oni povas aboni pere de nia Administracio.

ĈIUMONATA INTERNACIA GAZETO

## ORIENTA AZIO

Estas bela gazeto kun kolorigitaj ilustraĵoj, en Japanujo, Ĥinujo kaj Korejo, ĝi ĉiumonate aldonas unu de „Meminstruitojn de Japana aŭ Ĥina lingvoj,“ aŭ diversaj katalogoj.

Jarabono: 1.20 sm; duonjare 0.60 sm; provnumero 0.10 sm.

(Ni ne akceptas poŝtmarkojn, krom Japana). Sin turni al la Redakcio „SEKAIGO ŜOIN“ OŬSA-KIMACI, EBARAGUN, TOKIO, JAPANUJO.

!! La plej malkara gazeto esperantista !!

## LA KULTURO

Progresema gazeto de laboristaj esperantistoj en Aŭstrio

Aperas regule 20an de ĉiu monato kaj havas ĉiam interesan enhavon. La jara abonpago 84Sd. (K 2—Fr. 2—M 2—); duonjare duone. Specimeno kontraŭ respondkupono. Postulu provnumeron! Abonu! La dua jarkolekto ĵus komencas!

Adreso: „LA KULTURO“, Praha II., Hybernska 7 (Laborista domo), Bohemio-Aŭstrio.

## Kuracisto

Internacia Medicina Monata Revuo. Unika Kuracista Gazeto Tute en Esperanto. Ĉiumonate Oficialaj Komunikadoj de la T. E. K. A.

Jarabono: Sm 3. Por T. E. K. A.—anoj—senpage.

Adreso de la Redakcio kaj Administracio:

Varsovio, str. Szopena № 1, Redaktoro: D-ro Ludwik Chybczyński.

## Germana Esperantisto

Duonmonata gazeto por la disvastigo de la lingvo Esperanto aperas en du eldonoj, alterne alternate.

Eldono A celas la propagandon por Esperanto.

Eldono B, estas pure literatura.

Jara abonprezo por Germanujo kaj Aŭstrio-Hungarujo 4 M. (2 Sm.), por ĉiuj aliaj landoj 2.250 Sm.

Laŭdezire oni povas aparte aboni ĉiun el ambaŭ tute sendependaj eldonoj por la duono de la supre montritaj prezoj.

Ader & Borel, Dresden—A 1, Struvesstr. 40.

## Kataluna Esperantisto.

Ĉiumonata gazeto, organo de la „Kataluna Esperantista Federacio.“

(50 societoj—pli ol 500 individuaj membroj.)

Sek. de Red.: Joseph Grau. Redaktoro: Fred. Pujolà, Kotizajo 4. fr. (1.600 Sm.)

Adreso: str. Gracia 12, Sabadell-Katalunujo.

**LA REVUO** Internacia monata, literatura Revuo kun la konstanta kunlaborado de D-ro L. L. Zamenhof

Literaturaj verkoj.—Teatraj verketoj.—Pezioj.—Informoj.—Internacia vivo. Unu numero: 0 fr. 50 (0 m. 200), Abono: por Francujo 6 fr.—Por aliaj landoj: 2 Sm. 800. Oni abonas ĉe Hachette kaj K-o, 79, boulevard St. Germain, Paris, kaj ĝiaj korespondantoj.

## The British Esperantist

VIII-a jaro. — Mondkonata pro sia pura stilo en literaturo! Aperas ĉiumonate!

Speciale redaktita fako pri Tutmonda Kroniko

Jarabono: Fr. 4 (1,50 Sm.).

Adreso:

Museum Station Buildings 133—136, High Holborn, London.

**POŝTA ESPERANTISTO** Oficiala organo de la Internacia Ligo de Esperantistoj Postoficistoj.—Ildepo

Aperas ĉiumonate; enhavas fakan kvarlingvan vortaron (germana-franca-angla-Esperanta), fakan frazaron, fakajn artikolojn pri poŝto, telegrafo, telefono kaj recenzojn pri literaturo, cu beletristika cu scienca. Diversnacia kunlaborantaro. Senpage sendata al Ildepaj membroj; jara kotizo: 1 sm; abon-prezo kun sendkostoj: 1 sm poŝtare

Oni sin turnu al la Ildepa oficejo ĉe

ARNOLD BEHRENDT, BRĚSLAU (GERMANUJO) MAXSTRASSE, 22

Konto: Ĉekbanko Esperantista

OFICIALA

## Gazeto - Esperantista

Organo de la Lingva Komitato, de la Konstanta Komitato de la Kongresoj kaj de la Internacia Konsilantaro

Unu numero Sm. 0,200. Jara abono: Sm. 2.—

Redaktejo kaj administrado: 51, rue de Clichy, Paris.

## „LA ONDO DE ESPERANTO.“

MONATA ILUSTRATA REVUO

(fondita en la jaro 1909).

La abonantoj de la j. 1912 jam ricevis senpage romanon de A. Tolstoj „Princo Serebjanij“, kies prezo por ne-abonintojn estas Sm. 1,60 afr. Nun ĉiu abonanto de la j. 1913, — krom 12 n-roj de l'gazeto, — senpage ricevos donaco belan Esper libron:

## „ORIENTA ALMANAKO“

el la lingvoj japana, ĥina, araba, ĥinda, sanskrita, persa, armena. kartvela k. t. p. k. t. p.

„La Ondo“ aperas akurate la 1-an daton, novstilo. Ĉiu n-ro havas 16—24 paĝ. Formato 17X26. Bela kovrilo.

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beltristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuzaj fakoj (kun premioj). Anekdotoj. Korespondo tutmonda. Poŝt. ilustr.

Anonco en „Koresp. Fakoj“ — 3 respondkuponoj

La abonpagon (2 rubl. = 2, 120 sm). oni sendu al librejo „Esperanto“ (Moskvo, Tverskaja, 26, Ruslando) aŭ al aliaj Esper. librejoj — poŝtmandate, respondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ per transpag. de Esp. Ĉekbanko.

Oni povas aboni „La Ondon“ pere de nia Administracio, Ŝopena 8, Varsovio.

## LINGVO INTERNACIA

(fondita en jaro 1895)

Centra organo de la Esperantistoj, eliranta post la 15-de ĉiu monato.

Ĉiunumere 48 paĝoj. Formato 13 1/2 X 20 1/2 cm.;

Jara abono: 5 fr. (Sm 2).

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, rue Lecépède, Paris (Francujo).

## La unua revuo Esperantista por la junularo JUNA ESPERANTISTO

Monata Gazeto ilustrata por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-lernantoj. En „Juna Esperantisto“ troviĝas: diversaj rakontoj kaj noveloj por la junularo, fabeloj, poemoj, lingvaj ekzercoj, amuzajoj, problemoj, k. t. p.

La jaran abono: 3 fr. (1,20 Sm) sendu al PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, rue Lecépède, Paris (Francujo).

Librejo Hachette & Ko.,

79, Boulevard Saint-Germain, Paris

## Scienca Gazeto

Internacia monata revuo pri scienco kaj industrio  
Oficiala organo de la „Internacia Scienca Asocio Esperantista“. Ĉefredaktoro: Ch. Verax.

Tiu nova revuo celas konigi la plej gravajn kaj novajn eltrovaĵojn kaj elpensadojn de la homa spirito, kaj tial ĝi estas interesa vulgarigilo por la scienca kaj industria progreso.

Verkita klare, precize simple, ĝi povas esti, pro tiu kaŭzo, komprenata de ĉiuj: unuaparte de neteknikistoj aŭ nescienculoj; aliiaparte de la novaj adeptoj de nia lingvo.

Jara abono Frs. 7,50 (Sm. 3), apartaj numeroj Frs. 0,75 (Sd. 30).

— Petu senpagan specimenon ĉe la Librejo Hachette & Ko. —

POŬECAMY ZNAKOMITY PODRĘCZNIK

## PAWŁA BERT'A

Elementarny Kurs Nauk Przyrodniczych

W tłumaczeniu ANNY KRATZER, z 48 wyd. fran.

WYDANIE II

- TOM I.** Rok pierwszy — dla dzieci od 7 do 10 lat. Treść: Człowiek.—Zwierzęta.—Rośliny.—Minerały.—Zjawiska codzienne 173 rycin. Cena w broszurze rb. 0,50, w oprawie 0,65.
- TOM II.** Rok drugi,—dla dzieci od 10 do 12 lat. Treść: Człowiek.—Zwierzęta.—Rośliny.—Kamienie.—Fizyka.—Chemja.—300 rycin. Cena w broszurze rb. 0,65, w oprawie 0,80.
- TOM III.** Rok trzeci,—dla dzieci od 12 do 15 lat. Treść: Zwierzęta.—Rośliny.—Kamienie.—Ziemia.—Fizyka.—Chemja.—Fizjologia zwierząt i roślin.—Wiedza stosowana.—550 rycin. Cena w broszurze rb. 1,15 w oprawie 1,35.

ŻAĎAĆ WE WSZYSTKICH KSIĘGARNIACH

SKŁAD GŁÓWNY W KSIĘGARNI GEBETHNERA I WOLFFA W WARSZAWIE.